

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. -:- -:-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. -:-

Respondo de atakito.

Pariza k-do ricevis de Serba socialisto, kiel respondon, jenan leteron:

„Pasis longa tempo, ke mi vin ne respondis. Mi ne volis respondi malmulte, sed mi ne havis tempon respondi al vi pli larĝe. Esfio kondamnis min ne aŭskultita, tio ne devus esti, kaj est red. de l. S. R. skribis tiel akre, tiel neĝentile, ke mi neniam legis ion similan. Pro ĉi tio mi pensis: Ĉu mi devas respondi ion aŭ ne? Nun mi estas tute kontenta, ke mi ne respondis tuj, ĉar nun mi ne estas kolera, kiel antaŭe, kaj mi povas skribi pli malvarme ol pli antaŭe. Krom tio, al mi helpis kamaradoj el Bohemujo, Rusujo kaj Bulgarujo. Mi estas tute kontenta kun tiu skribado, ankaŭ ĉar ĝi donis al mi agrablan pruvon, ke esperantaj gazetoj estas legataj nuntempe ĉie, kaj Esperanto ĉiam kaj ĉie disvastigas sian bonegan influon.

Tiun „faman” poŝtkarton mi skribis tute rapide por nur diri al vi kelkajn vortojn, ke vi ne devis observi ĉi tiun balkanan militon kiel kutimaj rabistaj militoj. Ĉar la balkanmilito ne estas sama afero kiel la Franca milito en Maroko; Angla kontraŭ Buroj; Italiana milito kontraŭ Tripolitano; Germana en Afriko; Rusa kaj Japano en Azio k.t.p. Balkana milito ne estas por preni fremdajn landojn, por submeti alinacianojn sub fremda nedezirinda malamika nacio, sub nova nedezirinda regno. Sed la balkanmilito kontraŭ turkoj havas tute alian karakteron. Tio estas revolucio kontraŭ turka sinjoreco kaj kontraŭ malbona kaj malkultura, kruela turka regno. Niaj

soldatoj, oni povas diri, nur helpas tiun revolucion. Antaŭ kelkaj jaroj oni preparis ĉi tiun revolucion, ĉar kristanoj ne povis pli suferi la turkan kruelecon, kaj ĉiam petis kaj petegis helpon de siaj liberaj fratoj. Vi vidis el la letero de nia bulgara kamarado (I.S.R. 1, paĝ. 3, Red.), ke en eŭropa Turkujo estas multe pli kristanoj ol turkoj 1) kaj ĉiuj kristanoj atendis niajn soldatojn kun ĝojo. kaj viroj kaj virinoj ploris pro feliĉo, ĉirkaŭprenadis kaj kisadis soldatojn, armilojn, vestaĵojn, donadis al ili manĝaĵojn, trinkaĵojn senpage kaj nomis ilin „niaj liberigitaj fratoj, vi liberigas nin post 600-jara sklaveco”.

Mi en mia poŝtkarto ne diris, ke ni per ĉi tiu milito enportos kulturon kaj progreson per glavo kaj per pafilo, sed mi volis diri, ke per glavo kaj pafilo, kiel per sole ebla, do necesa rimedo (bedaŭrinde) ni deziras finigi la turkan malkulturan reĝimon, kiu ne permesas kulturen progresadon al iu nacio en Turkujo, eĉ ne al turkoj mem. Mi ripetas: nia balkanmilito estas revolucio kontraŭ turkoj por liberigi niajn fratojn, por ke ili povu fari progresan kaj kulturen movadon kune kun ni, por ke ili povu vivi libere kun sia familio sen timo por siaj vivoj; por ke ili povu ĝui produktojn de sia propra laboro, por ke ni en Serbujo, Bulgarujo, Grekujo kaj Montenegroj povu devastigi nian laboran kampon kaj ni socialistoj nian socialistan propagandon en la lando en kiu ĝisnun socialismo ne „kreskis”, kaj kelkaj milionoj da loĝantoj ne havis rajton havi socialistajn organizaciojn.

Antaŭ ol mi respondos al vi kaj al redakcio mi devas diri kelkaj vortojn. Estas regulo, ke ĉiuj devas paroli pri aliaj nur tion, kion oni scias ĝuste, pri kio oni scias, ke ĝi estas vera. Ĉu ni estas kontraŭ milito aŭ por milito, ni, kiel socialistoj, estas devigataj diri nur ion, kio estas vera, speciale socialistoj ne devas paroli malbone pri soldatoj, kiuj militas, se oni ne estas *certa*, ke ili faris malbonaĵojn. Oni devas ĉiam supozi, ke inter tiuj soldatoj estas multaj socia-

1) Ĉi tiu statistiko, kiu donis bulgara k-do, ne estas ĝusta kontraŭ Serboj, ĉar ĉi tiun bulgaran statistikon faris bulgaraj ŝovinistoj kaj ili same kiel serbaj ŝovinistoj kalkulas serbojn je bulgaroj. En nia nacia statistiko, kion vi povas trovi en libro: L'annexion de la Bosnie et la Question de Serbe, par Foran Crijjić, professeur de l'Université de Belgrad. — Paris, Librairie Hachette et Cie (1909), ke estas serboj en eŭropa Turkujo: 1.030.000 kaj en Bosnio kaj Hercegovino ankoraŭ: 1.799.200 samnaciaojn.

listoj, bonaj laboristoj, progresaj homoj, honestaj vilaĝanoj, kiuj ne deziras militi, sed ili militas, ĉar ili estas devigataj militi.

Mi dezirus respondi al vi kaj al redakcio pri ĉio, kion vi diris, pri ĉiu ideo, kiun vi tuŝis, sed tio estas malfacila, ĉar mi devus pri ĉiu tuŝita ideo skribi kelkajn paĝojn; tial mi koncentrigas tiujn ideojn en kelkaj demandoj:

I. 1. Ĉu ĉi tiu milito estis nur sola rimedo por liberigi niajn fratojn? 2. Ĉu nun estis taŭga momento por milito? 3. Ĉu ni estas sufiĉe kapablaj enporti kulturon en liberigitaj provincoj? Kaj poste:

II. 1. Ĉu milito pro nacia liberigo estas permesata de la socialistoj? 2. Ĉu socialistoj estas devigataj kalkuli pri la nacionalismo aŭ ne? (t. e. ĉu la etnografiaj esprimoj: slavoj, turkoj, romanoj, germanoj, havas nenian signifon por socialistoj).

I. Mi scias vian opinion, ke oni devas enkonduki reformojn en eŭropa Turkujo. Jes, vi estas prava; sed kiu devas enkonduki tiujn progresajn reformojn? Turkoj tion ne volas fari, ĉar ili nenion laboras; ili vivas per la kruela ekspluatado de l' kristanoj, tial ili, kompreneble, neniam volos fari reformojn.

Eŭropa koncerto (grandaj fortoj) ne estis iam unuanima, unuvoĉa kaj tio estis kaŭzo, ke reformoj ne povis esti, bedaŭrinde, enkondukataj sen milito en Turkujo. Via opinio, ke balkanaj reĝoj devis nur diri laŭte al Eŭropo: „Trudu reformojn en Turkujo kaj la afero estis finita”, — estas infane naiva. Vi devas scii ke Turkujo estis ĉiam ora lando por eŭropaj kapitalistoj. En Turkujo ne ekzistas industrio nek agrikulturo; en Turkujo ne estas komercistoj; ĝi vivas de la franca, angla kaj germana kapitalo, ĝi estis kolonio por Aŭstrio. Tio estas kaŭzo, ke Eŭropo ne estis sincera pri reformoj. Krom tio, Aŭstrio kaj Germanujo atendas nur taŭgan momenton por rabi la regionojn Novi-Bazar, Malnova Serbujo kaj Makedonujo por veni en Salonikon. Tio estas germana politiko konata sub devizo: „Drang nach Osten” (Antaŭenpuŝo al l' Oriento).

Fidela al tiu politiko, Aŭstrio forrabis antaŭ 4 jaroj Bosnion kaj Hercegovinon, du landoj kie vivas puraj serboj, kaj tio estis nur unu paŝo de la antaŭenpuŝado al Oriento. En nuna momento vi povas vidi, ke Germanujo kaj Aŭstrio neniam estis sinceraj pri reformoj. Nune Germanujo kaj

Aŭstrio helpas Turkojn kaj nur ili ambaŭ estas kulpaj, ke ne ankoraŭ venis definitiva paco. Nur Aŭstrio kaj Italujo preparas Albanujon, kiu neniam ĝisnun ekzistas, kiel aparta ŝtato. Aŭstrio deziras Albanujon, ĉar ĝi deziras per la sovaĝaj Albanoj fari ĉiam malpacon en Makedonujo por prepari momenton por interveni kaj forrabi Salonikon.

Vi vidas nun klare, ke Aŭstrio kaj Germanujo neniam volis permesi reformojn en Turkujo, ĉar ili scias tre bone, ke naciojn, kiuj vivas en Turkujo, ili ne povas forrabi, kiam tiuj nacioj estus pli kulturaj kaj kiam Turkujo estus pli organizita ŝtato. Aŭstrio deziras ĉiam „kapti fiŝojn en malklara akvo” kiel diras serba proverbo, tial ĝi deziras, ke en Turkujo estu ĉiam malordo. Vi vidas nun, ke balkanaj ŝtatoj estis devigataj per terura milito preni provincojn en kiuj vivas iliaj samlandanoj, ĉar, se ili tion ne farus nun, tion farus Aŭstrio. Sed balkanaj ŝtatoj preferas nun militi kontraŭ turkoj ol post mallonga tempo kontraŭ Aŭstrio.

Do: Eŭropo estas kulpa, ke tuta Makedonujo, Malnova Serbujo, Trakio, Epiro, Albanujo, estas surversitaj per homa kaj besta sango kaj kovritaj per homaj kaj bestaj korpoj. Ĉar Eŭropo ne estis sincera por fari reformojn, kaj ĉi tiu milito venis kiel rezultato de la malsukceso de Eŭropo: reformi Turkujon. Ĉu ni estas kulpaj, ke ni ne povis pli atendi tiujn neniam finitajn reformojn? Ĉu ni devus atendi ĝis turkoj senkapigis la lastajn niajn fratojn, kaj ĝis turkoj forkondukis la lastajn niajn fratinojn en turkajn haremojn? Ĉu ni devis atendi de la „kultura” Eŭropo liberecon por niaj samlandanoj, kiam ni vidas, ke tiu Eŭropo atendas nur taŭgan momenton por formanĝi eĉ nin mem? Ĉu ni devis peti al Eŭropo almozon? Ne, milloje ne, ĉar ni ne estas almozuloj kaj ni sentas nin sufiĉe kapablaj kaj fortaj mortigi la tiranojn, kiuj kvincent jarojn turmentis nin! Ni nun deziras nenion de Eŭropo, ni deziras nur unu: kiam ĝi ne helpis antaŭ milito, ĝi devas lasi nin sole aranĝi nian aferon kun la venkita tirano.

Ĉu mi estas prava, ke milito estis nur sola rimedo kaj nun estis tre taŭga momento por milito kontraŭ turkoj? Vi certe ankoraŭ dubas, vi, kiel estimata redakcio de I. S. R. pensas, ke mi ne estas socialisto, sed ŝovinisto. Se vi tiel pensas, vi eraras. Mi petas vin: legu ankoraŭ unufoje la manifeston de Basel, kaj vi vidos, ke socialista kongreso pensas same kiel mi! Ĉu „Esfio” abomenas ankaŭ baselan manifeston kiel mian poŝtkarton?!

Je la tria demando — ĉu ni estas sufiĉe kapablaj enkonduki kulturon en liberigitaj provincoj — por mi estas tre facile respondi, ĉar mi skribas al socialistoj. Vere, mi estis tre surprizita kiam mi legis en socialista gazeto: ke serboj 1) estas bestoj, sovaĝuloj, ke ili staras malsuper la nivelo de plej malaltaj barbaroj!! Sed s-roj redaktoroj de I. S. R. pensas tiel pri serboj, eble tial, ke serboj multe mortigis siajn malamikojn, siajn kontraŭulojn en la milito. Vere, la kuraĝaj serbaj soldatoj per tre, tre precizaj kanonoj kaj pafiloj, kiujn faris francaj laboristoj (certe multaj socialistoj), mortigis sennombre turkajn soldatojn dum la bataloj. Niaj soldatoj preferas esti dum la bataloj kiel lupoj kaj tigroj ol kiel ŝafoj. Ili preferas mortigi turkojn ol esti mortigata de la turkoj. Sed post la bataloj serboj estis vere kavalliraj. Ili sendis serumon kontraŭ tifo por malsanaj turkaj soldatoj al Djavid Paŝa, post batalo apud Bitolj (Monastir), ĉar Djavid petis pri tio. Serboj nutras malriĉulojn turkajn kiel serbajn; donis pensionon al turkaj oficiraj virinoj kaj familioj. Serboj lasis en libereco ĉiujn turkajn kuracistojn, kiujn niaj soldatoj kaptis dum la bataloj, por ke ili povus foriri en Turkujon. Tiuj kuracistoj tute libere foriris el Serbujo en Aŭstrion kaj poste en Turkujon por kuraci siajn soldatojn.

Mi rimarkigas vin, ke en Serbujo estis kelkaj dekmiloj da militkaptitaj turkoj kaj albanoj, kaj serboj povis uzi turkajn kuracistojn por kuraci iliajn samlandanojn turkajn, ĉar multaj el ili estis malsanaj, sed serboj lasis ilin en libereco kaj niaj propraj kuracistoj kuracis turkojn kaj albanojn kaj unu el niaj kuracistoj mortis, dua estas tre malsana, kaj mortis tri serbaj flegistoj, ĉar turkoj kunportis el Azio teruran tifon, kaj kiu scias kiom ankoraŭ mortos pro tio. „Igdam”, turka ĵurnalo, kiu aperas en Konstantinopol, nun dum milito, post nia lasta batalo, skribas, ke serbaj soldatoj estis tute ĝentilaj; ili ne perfortas virinojn; ili prenas nenion senpage, ili ne elrabis domojn kaj butikojn; ili ne faris nedireblajn hontajojn je kadavroj de virinoj kaj infanoj! Se diris iu pri serboj, ke ili faris diversajn malbonaĵojn, tio estas malhonesto mensogo. Sed, se tion pri serboj diris neniu, estimata redakcio ne devus juĝi, ke serbaj soldatoj pruvis, ke ili staras malsuper la nivelo de la plej malaltaj barbaroj. Mi petas, estimata redakcio, diru al mi nomon de tiu kuracisto aŭ flegistino aŭ ĵurnalo en kiu tio estis presata, kaj mi diros al vi multajn

1) Mi parolas nur pri la serbaj soldatoj.

tre konatajn nomojn en Eŭropo, kiuj parolas tre laŭdante pri niaj soldatoj, eĉ „Igdam”, malamika ĵurnalo skribis laŭde pri niaj soldatoj. Ĉu tiuj okulatestantoj ne estis aŭstriaĵ konsuloj?!

Vi scias, ke s-ro Prohaska, aŭstria konsulo en Prizren, presis en aŭstriaĵ kaj hungaraj gazetoj, ke serboj detranĉis al li lian „virecon” aŭ pli ĝuste „virajon”, sed tio, kion diris s-ro konsulo, estis nur malhonesta grandega mensogo. Imagu, mi petas vin, kiam konsuloj mensogas tiel malhonore, kiel mensogos ordinaraj spionoj, kiuj estas pagataj por fari grandegajn kaj nedireblajn mensogojn; kiuj en ĵurnaloj ne subskribas siajn nomojn; kaj aliaj ŝovinistoj, kiel „fidindaj okulatestantoj”, kiuj ne foriris pli malproksime ol ĝis Belgrado, aŭ kiuj fabrikas siajn mensogojn en Vieno kaj Budapeŝto? Ĉu vi legis, ke via konata skribisto Pierre Loti skribas en sia libro „Turkujo je la morto”, ke serboj kaj bulgaroj elpikis okulojn al turkoj? Li diris, ke li tion skribis laŭ leteroj de oficiroj de franca milit-ŝipo „Bruix”, sed oficiroj sciigis, ke ili tion ne skribis, ĉar ili tion ne vidis. Kie estas vereco?

Certe, okazis kelkaj kruelajoj de niaj soldatoj en Albanujo, sed tiuj kruelajoj venis nur kiel necesaj punoj. Albanoj, vidante, ke ili ne povas batali kontraŭ niaj soldatoj, ĉar niaj soldatoj estas pli kuraĝaj ol albanoj, kaj serboj estas pli multe ol ili, albanoj donis siajn armilojn al serboj kaj diris: Ni ne batalos pli kontraŭ vi, lasu nin ĉe ni por labori, ni obeos vin. Sed kion ili faris? Kiam niaj soldatoj foriris, kaj kiam, poste, venis profianto aŭ telegrafiaj laboristoj aŭ inĝeniĝeroj kun laboristoj por fari pontojn, vojojn k.t.p., albanoj prenis siajn kaŝitajn pafilojn, ĉar ili havas ĉiam duoblan aŭ trioblan armilon, kaj frapis surprize je serboj kaj mortigis multajn. Kompreneble, niaj soldatoj tuj revenis kaj punis kelkfoje tre kruele. Vi vidas, ke tiu puno estis necesa. Se albanoj defendas sian patrujon, ili devas bati kaj militi kontraŭ niaj soldatoj, tio estas respektinda, sed estas tute nerespektinda, mortigi laboristojn, kiuj ne mortigas sed laboras, kaj laboras vojojn, pontojn, telegrafon, kio ne ekzistas en Albanujo, kaj estas utilaj por albanoj mem. Vere, albanoj estas sovaĝuloj en ĝusta signifo de tiu vorto.

Ĉu ni serboj estas kultura nacio? Mi pensas, ke landoj en kiuj ekzistas liberaj socialistaj organizaĵoj, kiuj estas fonditaj tre serioze kaj sur tre solida bazo, kaj kiuj ekzistas en ĉiuj urboj, urbetoj kaj eĉ en multaj vilaĝoj; ke landoj en

kiuj ekzistas socialistaj ĵurnaloj, revuoj, socialista literaturo kaj socialistaj deputitoj, ne povas esti malkultura kaj tiaj nacioj estas kapablaj enkonduki novajn provincojn en nova vivon, certe, sub tre malfacila kaj terura kapitalista reĝimo, sed tiu reĝimo estas tamen pli bona, pli kultura, pli utila kaj eĉ pli facila ol vivo, kiu ekzistis ĝis nun en Turkujo.

Jes, certe, por laboristoj ne estos en nova reĝimo facile vivi, sed mi demandas: ĉu en kultura Francujo, Anglujo, Germanujo k.t.p. por laboristoj estas facile vivi? Ne, certe, ne! Ĉu ne multaj miloj da laboristoj rifuĝis el sia patrujo — nome el Eŭropa Turkujo, en kapitalistan landon: ekzemple al Usono, en kiu estas plej kruela kapitalista ekspluatado, kie ili vivas tre malproksime de siaj familioj, kie ili restas kelkajn jarojn aŭ restas por ĉiam ĉar ili ne povis gajni sufiĉe da mono por reveno? Tio signifas, ke en Ameriko kaj en aliaj, kapitalistaj landoj estas pli facile vivi ol en Turkujo.

Mi nun ne parolos pli pri nia kulturo, tio ne estas necesa, ĉar en francaj, anglaj kaj aliaj gazetoj estas presitaj artikoloj, kiuj parolas tre favore pri serboj kaj, certe, vi legis ĝin, kaj certe, vi legos ankoraŭ multajn artikolojn skribitajn de sufiĉe konataj homoj kaj mi ne havas bezonon skribi pli pri ni serboj. Mi markas nur, ke vi devas legi, se vi deziras esti sendependa, kion skribas en sia ĵurnalo pri serboj kamarado Vandel, socialista deputato en Germanujo. Li konas nin bone, ĉar li venis kelkajn fojojn en Serbujo kaj li konas nian kulturon. Fine, mi petas vin nur por unu: kedu nenion el aŭstriaĵ kaj germanaj burĝaj ĵurnaloj, ĉar ili skribas pri ni ĉiam malĝentile kaj malvere.

Mia letero, senintence, tiel grandiĝis, ke mi ne povas ĝin daŭrigi nun, tial mi respondos je la dua grupo da demandoj en mia sekvonta letero. Kaj mi donas mian honoran vorton, ke tiu sekvonta letero ne estos tiel granda kiel ĉi tiu!

Individue mi restas via amiko

„SOCIALISTO”.

La Balkanmilito.

II.

La bataloj inter la nacioj. — Tia do estis la sorto de l' slavkristanaj kampistoj dum dua duono de 19a jarcento: Ili konstante malriciĝis. Ili falis en la manaĉojn de grenkomerc-

istoj-spekulantoj, kiuj ofte samtempe estas impostisto, per kio li havas egan potencon en sia regiono. Tial li ĉiam scias devigi la kampistojn, ke oni vendas sian grenon k. t. p. nur al li, je prezo de li fikso. Ĉiuj profitoj de fervojkonstruo tial venas al la grenkomercistoj. La kampistoj, antaŭe grandparte liberaj kulturistoj sur sian teron, fariĝas terluantoj kaj iĝas per tio dependaj de l' terposedanto, kiu konstante pliigas la luprezon, kaj tiel deprenas al la kampistoj la laston, kio restis al ili. La terposedantoj kaj grenspekulantoj fariĝis riĉegaj, la kampistoj subiris en mizero, frakasataj sub la triobla ŝarĝo de socia, nacia kaj religia subpremo.

Krom tio, la slavakristana loĝantaro estis disŝirata de intersia malpaco.

Inter la terposedantoj kaj la kampistoj staris la greka burĝaro kaj la greka eklezio (pri kies rolo jam skribis nia bulgara k-do-kunlaboranto en siaj artikoloj pasintjare). La grekoj restis, post disfalo de l' regno bizanta (jaro 1453), klaso pli-malpli privilegiita en la imperio otomana. Ilia religio iĝis kvazaŭ „kristana ŝtatreliĝo” de tiu imperio. La grek-kristana komunumo estis la sola organizajo inter la kristanaj kampistoj; la grekkristana lernejo la sola ne-mohametana instruejo. Per tio naskiĝis inter ili grekkristana kulturo.

Tamen, iom-post-iom naskiĝis inter la slavaj kampistoj ega malamo al la grekoj. Ĉar, la greka burĝaro, certe, estis kristana, sed ĝi ekspluatadis la slavan loĝantaron ne malpli ol la mohametana terhavanto tion faris. La greka procentegisto, kiu elsuĉis la loĝantaron; la greka impost-entreprenanto, kiu estis tiel senkompata kiel la turka; kaj la greka eklezio, kiu devigis je pago de alta ekleziimposto, estis, fine, same tiom malamataj kiom la turka perfortregado mem. Tiu malamo sin direktis precipe al la greka eklezio, la plej grava greka institucio de potenco.

Kiam Bulgarujo sin estis liberiginta de l' jugo otomana, tiam ĝi tuj forpelis la grekajn pastrojn; kaj en eklezio kaj instruado la bulgara lingvo tuj anstataŭigis la grekan. Baldaŭ tiu kontraŭgreka agado disvastiĝas ekster la limoj bulgaraj, inter la makedonaj kampistoj; — komenciĝas tie vigla propagando kontraŭ la greka eklezio (la patriarkato), kaj por la bulgara eklezio (la eksarkato).

Baldaŭ, tiu porbulgara propagando ekkolizias kun la interesoj de (ankaŭ sin liberiginta) Serbujo kaj Rumenujo. Serbujo konstatas kun envio tiun „spiritan konkiron” de Makedonujo de l' bulgaroj. Ĝi vidas, ke la Makedonaj kampistoj

iom-post-iom iĝas bulgaroj; Bulgarujo apogas ilin per sia influo, per sia mono; ili obeas la eklezion en Sofio; ili akceptas la bulgaran lingvon. Serbujo antaŭvidas: se iam okazos divido de l' turka imperio en Eŭropo, tiam restos por Serbujo — nenio, kaj la revo de l' serba ŝovinismo: iutempe (per aldono de Malnova Serbujo al la Serba regno) veni al fondo de iu Granda-Serbujo, tiu revo solviĝus je fumo. Al la bulgara propagando ĝi tial kontraŭmetas la sian; ĝi penas instigi la kampistojn en Malnova Serbujo kontraŭ la eksarkato kaj propagas la fondon de propra serba komunumo en la greka eklezio, submetita al la greka patriarko en Konstantinoplo, sed kun serbaj pastroj kaj uzante la serban lingvon. Fine, aperas sur la scenejo ankaŭ Rumenujo; ĝi nek ankaŭ deziras cedi sian revon pri Pli Granda Rumenujo; ĝi, siavice, penas organizi la raso-parencajn Kutzovalaĥojn de Makedonujo, en aparta rumena komunumo, apartenonta al la ĝenerala greka eklezio, sed kun rumenaj pastroj kaj kun la rumena lingvo.

Tiel batalas inter si grekoj, bulgaroj, serboj, rumenoj. Ĉiu el ili faras propagandon por siaj propraj interesoj.

Tiu propagando ne estas paca.

Ni jam scias, ke inter la en malespero kaj mizero pereintaj kampistoj sin formis: armitaj bandoj, vivantaj per rabado. La kristanaj sektoj uzas tiujn bandojn inter si unu kontraŭ la aliaj. La situacio prezentas aspekton de senlima konfuzo. Ŝajnas, ke la Makedonaj kampistoj pensas nur pri la demando: al kiu el la konkurantaj sektoj ili aliĝos. Sed la efektiva situacio estas, ke la Makedonaj kampistoj estas elrabataj kaj mortigataj de la bandoj, en servo de l' religiaj sektoj; ke, por savi la vivon, ili hodiaŭ, minacataj de bulgaraj banditoj-propagandistoj, juras eternan fidelecon al la eksarkato, por morgaŭ, atakataj de serba bando, kaj postmorgaŭ, antaŭ la ponjardoj de grekaj misiistoj, deklari sin ĝismorte fidelaj al la patriarko en Konstantinoplo, — laŭ cirkonstancoj sub aŭspicioj de l' serba aŭ de l' greka komunumo.

Estis la ruza politiko de Abdul-Hamid, daŭrigi tiun bando-bataladon. Dum la kristanoj tiel baraktis inter si, la turka regado povis esti ja certa de sia potenco! Sed, fine, tiu politiko fariĝis, tamen, danĝera. Kaj kiam, pro la senfinaj rabiroj de l' bandoj, elĉerpita Makedonujo ne povis plu pagi impostojn; kiam la konfuzo fariĝis tiel ega, ke la grandŝtatoj minacis interveni; kiam eĉ la turkaj terposedantoj mem ne estis plu ekster danĝero por la atakoj de la bandoj;

tiam Abdul-Hamid komencis agadi kontraŭ la bandoj, kiujn per sangaj buĉadoj li penis ekstermi. Sed, tiu agado havis rezulton malan al tiu, kiun ĝi celis: la inter si luktantaj kristanoj koaliciis kontraŭ la komuna malamako, kontraŭ la turka uzurpanto. La batalo de l' turkoj kontraŭ la bandoj naskis ribelon kontraŭ la turka regado (jaro 1903). Nun la grandŝtatoj intervenis.

(Daŭrigota).

W. N.

Kontraŭ la freneza armigado!

La estraroj de la franca kaj germana socialdemokratia publikigis jenan manifeston:

En Germanujo same kiel en Francujo denove la registaroj preparas leĝproponojn, per kiuj la grandegaj impostoj militaraj ankoraŭ kreskas. En ĉi tiu horo konsideras la franca kaj germana soc.-dem. kiel devo pli forte kuniĝi, por unuiginte bataladi kontraŭ tiu preskaŭ freneza agado de l' regantaj klasoj.

Ni protestas unuanime kontraŭ la senĉesaj armigoj, kiuj malfortigas la popolojn, malhelpas plenumi la necesajn kulturtaskojn, pligrandigas la reciprokan malfidon, kaj anstataŭ certigi pacon, naskas konfliktojn, kiuj kondukas al mondmilito kaj kiel naturaj sekvoj, al amasa mizero kaj ara detruo.

La soc.-dem. de ambaŭ landoj prave povas nomiĝi reprezentanto de la popoloj, deklarante ke la popolamasoj plej grandparte deziras la pacon kaj abomenas la militon. La klasoj potencaj ĉi tie kaj tie pliakrigas la naciajn diferencojn anstataŭ helpi detruo ilin, kaj ili deturnas la popoloj de l' kulturlaborado, de l' liberigbatalo.

Por certigi la pacon, la sendependencon de l' popoloj kaj la progreson sur ĉiaj kampoj, la soc.-dem. postulas, ke ĉiujn diferencojn inter ŝtatoj devu forigi arbitracia tribunalo; ĝi sentas la perfortan solvon de diferencoj kiel barbareco kaj honto por la homaro. Ĝi postulas plue la forigon de konstantaj armeoj, kiuj formas konstantan minacon de la paco, kaj anstataŭon de ili per milicio sur demokrata fundamento nur por defendi la landon.

Se tamen — malgraŭ nia kontraŭstaro — oni pligrandigos la armeelspezojn, tiam la soc.-dem. de ambaŭ landoj tut-energie batalados por tio: ke la ŝarĝoj estu metataj sur la ŝultroj de riĉuloj. Ni jam estinte senmaskigis la malsinceran

agadon de l' ŝovinistoj en ambaŭ landoj, kiuj en Francujo laŭdas la militemecon de l' germ. socialistoj kaj en Germanujo tiun de l' francaj. La komuna kontraŭ-batalado de ŝovinismo devas sufoki la trompon.

La sama voko kontraŭmilita, la sama kondamno de „armigita paco” resonas en ambaŭ landoj. Sub la standardo de la internacio, la germana kaj franca soc.-dem. tutforte daŭrigos la batalan kontraŭ la nesatigeblan militarismon, por reciproka interkonsento, por daŭra, eterna popolpaco!

P.S. Nun la germana registaro proponas novan imposton por reguli la novajn elspezojn por armeo kaj marino. La riĉuloj devu pagi destinitan parton de sia posedajo. Eble, ili tiel baldaŭ perdos la emon por plua pligrandigo de la armeo. Ankaŭ la impostliberecon de l' princoj oni intencas forigi. Ĝis nun tiu ĉi ne pagis impostojn, kiom ajn da posedajo ili havas.

W. K.

SOCIA MOVADO.

El Franclando.

La reakcia frenezo blovanta nun en Franclando devigas min paroli pri tiuj aferoj, forlasante por pli malfrua tempo la finon de mia tradukajo.

De 18a de Februaro ni havas? novan prezidanton de l' respubliko. Kiam mi skribas: ni havas prezidanton, estas nur formo ĝentila, de demokratiano, ĉar estas li kiu havas nin.

Tio ŝajnas nekredebla, en lando de libereco, en kiu la civitanoj elektas homojn por ke ili reprezentu la popolon. Sed estas la elektotoj kiuj serĉas elektontojn.

Afero komenciĝanta tiel strange finiĝas same. Tial nia prezidanto havas nin.

De kiam li zorgas pri nia feliĉo, venis nova armea projekto. De 1908 la daŭro de l' militservado estis 2 jaroj.

Nun li volas ke tiu daŭro estu plilongigata ĝis 3 jaroj.

Li volas — kune kun sia malbonfarantaro — 500 milionojn da frankoj por la armea budĝeto. (En tiu sumo ne estas kalkulitaj la novaj elspezoj por zorgo de la soldatoj dum unu jaro).

Jen kiel komenciĝis la afero.

En Franclando la propagando Nov-Malthusiana trovis eĥon. La laboristoj ne plu naskas tiel senkonscie kiel antaŭe.

Oni scias, ke nur la laboristoj — la proletarioj — liveras soldatojn. La riĉuloj estas oficiroj, aŭ restas hejme.

Limigante la naskon, la proletarioj atencis al armeo: en proksima estonteco mankos soldatoj.

Tial la nova projekto.

Oni diras ankaŭ: la Germanoj, niaj malamikoj, plimultigas sian armeon, ni ne devas prokrasti. En Germanujo oni diras: en Francujo oni plinombrigas sian soldataron, ni ne perdu tempon.

La aĉa gazetaro tiel mensogis, ke ĝi montris la germanojn nombrojn ĝis 865.000, vere ili estas 638.000. En Franclando estas 611.000 soldatoj. La loĝantoj estas 68 milionoj kontraŭ 36. Ni estas kiel la rano kiu volis tiel dikiĝi kiel la bovo.

Por influi, en la liceoj, en multaj urbaj gimnazioj, la profesoroj per sia aŭtoritato devigas la lernantojn subskribi peton en kiu ili diras sian feliĉon pro la nova projekto.

Por respondi, la Parizaj sindikatoj organizis gravan mitingon okazintan la 16an de Marto. Ĉeestis 200 miloj da homoj.

Kvindek paroladistoj entuziasme parolis de l' supro de 11 tribunoj, eĉ unu kamarado parolis pri Esperanto kiel paca ilo.

Dum la sama tempo okazis parado, nomita printempa parado.

La protesto estas bela tra la tuta lando; se ĝi ne dolĉiĝas la projekto estos forlasata.

Tiel nia nova prezidanto alportis nur malbonaĵon. Amnestio — tamen necesega, la malliberejoj estas plenaj — estis atendata. Ĝi estas nun atendata. Tio ne estas grava.

Por fini, jen kiamaniere la francoj portis civilizacion, lumon de sia spirito, al Maroko.

La francoj portis alkoholismen. En la urbo Kasablanko la nombro de trinkejoj estis en 1907a 6. ĝi estas nun 161.

La enportado de alkoholo duobliĝis de 1909a ĝis 1910a.

Tio estas nobla celo. Niaj soldatoj pli bone laboros por eduki la venkitojn kiam ili lernos 3 jarojn (se okazos).

Ĉar malbonaĵo estas neniam sola, la reakcio sentigas sin en la medioj socialistaj.

En kooperativo „La Bellevilloise” en Parizo, okazis skandalaj aferoj pro spionado de l' laboristoj tie laborantaj. „La Bataille Syndicaliste”, ĉiutaga ĵurnalo, kaj „Le Libertaire”, anarĥista ĉiusemajna, sciigis la aferon kaj kritikis la kooperativon. Ĝi faras proceson al la du gazetoj, petante dikan sumon da mono.

Malbeninda reakcio!

A. PANLOU.

N.B. 4 anarĥiistaj ĵurnaloj estas malpermesitaj. La vendistoj dependantaj de administracio de Parizo estos punataj se ili malobeas. Kiel en Rusujo.

El Anglujo.

„DONU AL NI HODIAŬ . . .”

Preĝo de angla panofarestroj dum la minacinta striko de l' bakistoj.



— Donu al ni hodiaŭ laboristojn kiuj estas puraj je koro, submetemaj laŭ spirito, tiel molaj kaj flekseblaj kiel la pasto, kiun ĉiutage ili knedas; kaj punu la malbonecon de l' agitantoj, kiuj volas ilin „levigi”.

(Kun afabla permeso de l' desegninto, s-ro Dyson, kaj de l' eldonanto de „The Daily Herald”, angla laborista ĉiutaga gazeto, k-do F. A. G. prezentas supran spritan ilustraĵon al la legantoj de nia Revuo.)

La fervojistoj de Mezlanda fervojo meditas la strikon pro la fakto, ke unu kondukisto estis maldungita sub preteksto, ke li malobeis la ordon de superulo, kvankam li agis laŭ la regulo-libro; ĉi tiu estas notinda. La kolorigistoj ne estas kontentaj, eĉ venko ne satas ilin!!

La dokistoj en Grimsby akceptis la proponojn de la Granda Centrala Fervoja K. io. kaj sub la promesoj de la estraro revenas al la laboro. La dokistoj en la apuda haveno Goole ankaŭ strikas; ilia malkonsento estas la dungado de ne-organizitaj laboristoj. Almenaŭ 200 strikoj estas raportitaj en Granda Britujo.

La kompatindaj publikulinoj estas ĉasitaj kaj ĉie kaptitaj per la policaro. Subite Anglujo moraliĝis.

La Britaj parlamentanoj ripozas laŭ kutimo ĉe tiu ĉi monato. Espereble, la I. S. R. aperos malgraŭ ĉi tiu katastrofo; tamen, homoj laboras kaj ĉio daŭriĝas, escepte la parlamentaj raportoj.

En Liverpool, 23/24 Marto, konferenco anarĥiista. Ŝajnas kvazaŭ la anglaj parolantoj anarĥiistaj pligrandiĝas eĉ pli rapide ol iu kuraĝas atendi. La fervojistoj regajnis la monopunon de semajna salajro el la kompanio (vidu Jan.-n-ron). Moralo: Nenio venkas solidarecon. Notinda estas la aktiveco de niaj kunlingvanoj en la kooperativa movado kaj oni povas esperi la akcepton de Esperanto en la proksima internacia kongreso kaj la kooperativa jurnalo (Cooperative News) ofte enhavas artikolojn pri Esperanto. Novajoj de ĉiuj landaj kooperativaj faradoj certe devas havi lokon en I. S. R.

Supren mi raportis pri minacanta striko de fervojistoj. Subite ŝajnis kvazaŭ revolucio okazus. La tuta fervojistaro deklaris favore al nacia striko; la kapitalistaro vere kaj efektive suferis panikon; ilia jurnalaro postulis la tujan redungon de la gvardisto, kiu (ili diras) tute prave rifuzis hazarde konduki sian vagonaron. Sed la reala bazo de ilia timo estis la redungoj de la fervojistoj, kiuj akceptis striki: 1. Por la redungado de Richardson (gvardisto) kaj la farado de regulo, ke neniu superulo rajtos doni buŝan ordonon kontraŭ la regul-libro, ĉiu kontraŭordono estos devige skribita kaj subsignita; 2e. por la universala okhora tago (nur kelkaj gradoj de fervojistoj ĝuas ĝin); 3. por la rekono de unuigoj, kaj la rajto al anoj, ke ili aperas antaŭ la superuloj de la fervojoj kune kun organizisto (kiu kompreneble estas pli libera kaj lerta antagonisto kontraŭ la la fervoja superulo).

La kompanio post esti altece rifuzinta la redungon de

Richardson, nun ofertas redungi lin kaj eldoni skribitan ordonon estonte kiam estas necese la rompadado de la libro-regulaj.

Je la momento de skribado mi ne scias ĉu la fervojistaro estos kontentigata per tio, ĉar ili ne estis kontentaj per la rezultato de la lasta nacia striko, kiam la estraro de la unuigoj subvendaĉis la strikintojn al la mastroj. En ĉi tiu afero la sola socialista jurnalo la „Daily Herald” bonege konsilis la fervojistaron kaj estas belega kontraŭ-doza al la laboro-jurnalo „Citizen”.

HOYLE.

El Aŭstrio.

La 11a de Februaro 1913 restos rememorinda tago en historio de movado laborista en Aŭstrio.

Unu el la plej bonaj pioniroj, kaj fervoraj defendantoj de nia ideo socialista — nia amata Francesko Ŝumajr (Schuhmeier) estas mortigita.

Mortigis lin inside sentaŭgula mano de politika kontraŭulo, frakasante al li la kapon per revolverkuglo pafita de malantaŭen, ĵus kiam li volis forlasi elirejon de la nordokcidenta stacidomo en Vieno.

La krimulo nomas sin Paulo Kunĉak, li estas ano de l' kristansociala partio, kaj frato de parlamenta deputito Leopold Kunĉak.

K-do Fr. Schuhmeier staris de sia 18a jaro en la movado socialista. Pro sia eksterordinara talento de l' parolo, kaj per memlernado, li baldaŭ fariĝis grava persono de soc.-dem. partio en Aŭstrio. Li estas ankaŭ sufiĉe bone konata en eksterlando pro siaj akraj paroladoj precipe kontraŭ militarismo en Aŭstr. parlamento. Li ofte silentigis parolantan kontraŭulon per kelke da vortoj de sia akra, ĉiam konvena humoro.

Krom tio li ĉiam heroe defendis la interesojn de la laboristaro, en landa kaj urba parlamento kies ano li estis, de jaro 1900. Al li ankaŭ apartenas la merito, ke li kaŭzis la ekziston de l' fi-fama Viena eksurbestro Neumaier.

Francesko Schuhmeier estis ne nur bona politikisto, li estis samtempe bonega organizanto. Li scias paroli al la laboristaro, uzante esprimojn el praktika ĉiutaga vivo.

La enterigo de l' falinta k-do okazis dimanĉon la 17an de Februaro je ĉeesto de pli ol duonmiliono da homoj. Ankaŭ eksterlandaj k-do, kiel el Germanujo, Hongarujo, Belgujo, Svisujo eĉ Nederlando, estis prezentitaj, per deputacioj.

K-do Francesko Schuhmeier starigis al si daŭran monumenton en koroj de la aŭstria laboristaro.

O. B.

Noto. La salajrata estro de holanda nacia Sekretariejo de Laboro (centro de tiuj sindikatoj, kiuj nomas sin anarhiistoj, kvankam la anarhiistoj diras, ke ili tute ne estas anarhiistaj), samtempe redaktoro de l' organo „Laboro”, sendis al la holanda anarhiista kaj duonanarhiista presaro artikolon (kiun tiu presaro enpresis), en kiu li „klarigas”, defendas, aprobas kaj aplaudas la mortigon je aŭstria soc.-dem. Franz Schuhmeier, kaj instigas al imito de tiu ekzemplo. La nomo de tiu homo, kiu tiel klopodas provoki atencojn je socialdemokratoj, estas Kolthek; certe, li estas kontraŭulo de milito, de militarismo! Notinda fenomeno de ĉiuj tiaj instigoj al mortigo je kontraŭuloj estas, ke la instigantoj ĉiam penas allogi aliajn, sed ne mem tuŝas eĉ per malgranda fingro tiun danĝeran taskon. Nu, tiu, kiu instigas alian homon al krimo, kiun li mem ne kuraĝas plenumi, estas pli granda krinulo ol tiu, kiu faras la krimon. Alivorte: Kunĉak, embuska mortiganto de Franz Schuhmeier, estas heroo, kompare al Kolthek, fi-malkuraĝa instiganto al embusko-mortigoj. Pri Kunĉak ni skuas la kapon, pri Kolthek ni levas la nazon.

Ni sciigis, ke el la gasista sindikato, kies organo enpresis la artikolon, multaj membroj pro tio transiris al la „moderna” gasista sindikato. Tia morala sovaĝiĝo, evidente, estis al ili tro abomena.

W. N.

El Galicio. (Daurigo de paĝo 38).

Drahomanov konfesis la racionalismon en kulturo kaj filosofio. Laŭ siaj konvinkoj li estis socialisto-federalisto: kiel idealon de socia organizacio li konfesis la liberan federacion de individuoj en grupojn, de tiuj grupoj en pli grandajn grupojn k. t. p. de malsupre supren, la socian vivon sen estraro, sur la bazo de laŭvola interkonsento, kion li opiniis ebla ĉe forestado de la privata propreco kaj ĉe la komuna produktado. Per tio li proksimiĝas al la anarhiismo de Proudhon kaj Bakunin. Sed li disiĝas de ili per tio, ke realiĝadon de tiu ĉi idealo li opiniis ebla sur la vojo de l' evolucio kaj de alta kultura grado de l' popolaj amasoj, kaj ne sur revolucia vojo; tial li proksimiĝas al nunaj Berŝtejnanoj. Kaj kvankam Drahomanov ne neas la ekonomiajn faktorojn de la evolucio, li tamen suprenigas en tiu evolucio ankaŭ influon de la intelektaj, idealaj faktoroj, kaj tial li staras proksime de t. n. „rusa socia skolo” de Lavrov-Mihajlov. Generale, la direkto, reprezentita de Drahomanov,

modifikita tiom, kiom la scienco progresis antaŭen, estas reprezentata nun de anarhiistoj-komunistoj.

En sia agado li devis defendi la rajtojn de Ukrainujo kontraŭ historia Polujo kaj kontraŭ centralistaj celadoj de Grandrusoj, kaj sekve tio la homo, al kiuj liaj samlandanoj riproĉis kiel la plej grandaj kulpoj kosmopolitismen, mokadon de „la naciaj sanktaĵoj” — ofte renkontis sur sia vojo epiteton: „ukraina nacionalisto.” Sed Drahomanov batalis nur je unu: por ke oni donu al la ukraina nacio aŭtonomiajn rajtojn decidi pri si mem.

En la fino de 80aj jaroj estis fondataj en Galicio du socialistaj partioj. La 1889 j. estis fondata „soc.-dem. partio de Galicio”, kiu komencis organizi laboristojn en urboj, ne konsiderante nacian apartenon. La sekvan jaron (1890) Pavlyk komencis eldonadi ĉusemajnan gazeton „Narod” kaj en la sama jaro fondiĝis „Ukraina radikala partio”. „Narod” fariĝis partia organo, kaj la partio mem disvolvis sian agadon ekskluzive en vilaĝoj inter kampuloj.

En sia programo difinis la partio, ke ĝi staras sur la bazo de la marksa socialismo kaj de la sociigado de produktiloj; tamen, de alia flanko ĝi penadis per serio da ekonomiaj postuloj kaj reformoj malhelpi la kreadon de vilaĝa proletariaro; sed, tio lasta signifas konservi kampulojn kiel apartan, en si mem fermitan klason. Tiu ĉi kompromiso de du kontraŭaj direktoj fariĝis baldaŭ la kaŭzo de la disrompo de la partio. Sed intertempe, ĝi plenumis grandan precipe kulturalan taskon, analizante en sia organo „Narod” sociajn problemojn, en multaj artikoloj pri socialismo-anarhiismo kaj pri laborista movado en okcidenta Eŭropo, kaj propagandante racionalismon inter vilaĝanoj: tiel ĝi preparis fundamenton al la posta disvolviĝo de l' socialistaj kaj anarhiistaj ideoj en Galicio kaj havis eĉ influon sur la samnacionojn en Rusujo. La plej granda merito de la radikala partio estas la propagando de la radikalaj ideoj kaj agitado per literaturo inter vilaĝaro t. e. inter malkleraj kampulaj amasoj, kiujn ĝi vekis kaj igis pensi kaj batali por iliaj rajtoj.

Baldaŭ en la partio estis kreitaj tri grupoj: la Drahomanova grupo kun siaj reprezentantoj Pavlyk kaj Franko, nacia-radikala grupo reprezentita de Eugen Levyckij, Onrymovyĉ kaj Budzynovskij, kaj fine la tria soc.-dem. grupo kun siaj samideanoj Hankevyĉ kaj Baĉynskij. La grupanojn de la unua oni nomis „maljunaj” kaj la anojn de la ambaŭ lastaj oni nomis „junaj.” La drahomanovanoj

defendis la socialistan propagandon inter kampuloj en vilaĝoj kaj agrarajn reformojn; soc.-dem. grupo agitadis inter urbana ukr. proletariaro, forigante decide ĉiajn agrarajn reformojn; fine la nacia grupo formulis postulojn de la ukr. nacio el vidpunkto de la interesoj de la tuta nacio, aŭ pli ĝuste de la interesoj de l' estonta ukr. burĝaro, kiu en 90a jaroj de la pasinta jarcento estis nur „Quantité négligeable”.

Skala a/Zbr.

M. B.
(Daŭrigota).

El Hungarujo.

Ĝemis la montoj kaj naskis muson — diras la proverbo. Sed nun ĝi eĉ tion ne naskis, sed — nenion. La laŭta bruego, kiun la soc. dem. partio faris por la amasa striko, finis je granda nenio.

La 4an de Marto komencis trakti la parlamento la leĝ-projekton pri la elektraĵto. Tiun ĉi tagon devus esti eksplodinta la amasa striko, sed tio ne okazis, ĉar la parlamenta opozicio en la lasta momento trompis la soc.-dem. partion. La opozicio kontentiĝis je malplena, solena(!) protesto en la parlamento kaj per tio ĝia agado finiĝis. La estraro de S.D.P. vidante, ke la laboristoj sole sur la stratoj nenion povas fari kontraŭ la bajonetarbaro, se ne estas en la parlamento kuraĝa opozicio, ĝi do prokrastis la amasan strikon al „konvena tempo”, Kio en vulgara lingvo tion signifas: ke ĝi estas enterigita.

Laŭ mia opinio la partiestraro ĝuste faris ne proklamante la ĝeneralan strikon, ĉar ĝi neniel estus venkinta. Sed mi kondamnas ĝin, ĉar ĝi ne pluen vidas ol la nazpinto. Tion ja ĉiu klera homo antaŭvidis, ke grafo Apponyi, grafo Andraši, Košuth k. a., la gvidantoj de opozicio, tute ne malhelpos la leĝigon de la projekto, ĉar antaŭ tri jaroj, kiam ili sidis en la ministraj seĝoj, ankoraŭ pli malbonan leĝon volis fari, ol la nuna registaro. Ili nur volis forpeli la nunan registaron, por ke poste ili mem sidu en ĝian lokon; ili nur tial bruegis malsincere pro pli bona leĝo, por reakiri sian perditan popularecon; dume ili sekrete ĝojis, ke la registaro faras malbonan leĝon pri la voĉdonraĵto, kiu ilin el ĉiu vidpunkto kontentigas. La gvidantoj de S.D.P. des malpli devus esti kuniĝinta kun la opozicio, ĉar ĝiaj gvidantoj jam plifojie trompis ilin.

El la nuna okazintaĵo la estraro de S.D.P. povos eklerni: ke ne estas utile manĝi ĉerizojn el la sama telero kun

grandaj sinjoroj; ke oni ne povas kapti paseron per tamburo; ke pli necese estas havi longan kaj akran prudenton ol longan kaj akran langon; ke la ĝenerala striko ne estas infana ludo kaj ĝin ne povas efektiviĝi per demagogio, sed kiu ĝin volas okazigi, tiu jam antaŭe devas fari viglan anti-militaristan propagandon, ĉar sen tio la ĝenerala striko neniam sukcesos! Sed la socialdemokratoj pli timas anti-militaristan propagandon ol diablo la incenson. Eĉ ili ne povas esti veraj antimilitaristoj, kaj ili bezonas iam soldataron, ĉar ili ne batalas kontraŭ ĉiuj potencoj — kiel anarĥiistoj — sed por la potenco! forgesante, ke ĉiu potenco povas nur baziĝi je la suferoj kaj subpremoj de aliaj, kaj ke ĝi eĉ unu momenton ne povas ekstari sen perforto, kiu enkorpiĝas en la ŝtato kaj ĝia armeo.

Nun la laboristoj tre koleras partiestraron, ĉar ĝi dum du monatoj tenis ilin en febra eksciteco vane.

SINCERA.

El Nederlando.

Grava sciigo. — La 26an de Februaro kaj 5an de Marto okazis la jarkunveno de la Haga Fak-Komitato (centro de l' Hagaj sendependaj metiunuiĝoj). La 26an kamarado Meijer, kun konsento de l' estraro, aranĝis malgrandan ekspozicion Esperantan. La 5an, post por-esperantaj paroladoj de k doj Meijer kaj Van Bommel, prezidanto de l' Haga Stukist- kaj sekretario de l' Masonistorganizajoj, la kunveno unuanime akceptis jenan rezolucion:

„La Haga Fak-Komitato:

Konsentante la grandan utilon de mondhelplingvo je la starigo de Internacio de sendependaj fakorganizajoj; kaj opiniante ke tio en transvidebla tempo estos fakto; kaj

Konsiderante ke la pruvita neŝanĝemeco kaj vivkapableco de l' facile ellernebla lingvo Esperanto, en la proksima estonteco povos fari grandajn servojn al la internacie organizita laboristaro;

insistas al ĉiuj siaj membroj proprigi al si tiun lingvon!”

Propono, por ne sole per paroloj, sed ankaŭ per faroj elmontri, ke ni aplaudas la Esp. movadon, per eltiri el la kason kelke da mono por ebligi al la Ned. Fed. de Lab. Esp. sendi delegiton al la Frankfurta kongreso dum Pasko, la kunveno forvoĉis. La plimulto opiniis: „ke, kvankam ŝatante la belan celon, ekpaŝante tiun vojon, la Komitato tuj estos supersutata de petoj je helpmono de societoj: anti-militistoj, abstinenc-

uloj, k.t.p., kies celojn ni opinias esti en intereso de l' tutmonda laboristmovado".

Por daŭrigi la propagandon mi afable petas, ke ĉiuj ligoj, societoj kaj grupoj sendu ŝatateston al Haga Fak-Komitato, Snijderstraat 65, Hago, Holando; la Esperantista gazetarano transprenu ĉi tiun kaj sendu ekz. de sia gazeto por ke Esperanto sukcesu.

Frate dankas,

K. H. M.

El Rusujo

12 Jan. nunjare, la soc. dem. fracio en rusa parlamento interpelaciis la registaron pri la turmentadoj, kiujn suferas la politikaj malliberuloj. La interpelaciantoj citas grandan vicon da faktoj, tion atestantaj. Jen kelkaj: 1)

En Riga malliberejo, je fino de Sept. 1912 arestitaj Timofejev, 18 jara, kaj Merin estis batataj per gumaj skurĝoj. Oni ŝtopis al ili la buŝon per malseka ĉifono kaj eltiradis harojn kaj dentoj kaj pendigis per seksorganoj.

En Tobolska malliberejo estas kutimo dum vipado post ĉiuj 10 batoj superŝuti la vundojn per salo.

En Grodna malliberejo oni batas per ŝtonoj enkudritaj en tolon, kaj la zorgoj de la malliberejestro konsistas en tio, ke li rekomendas batadi sen gravaj sekvoj.

En Kutaisa malliberejo 8 Jan. nunjare la helpanto de la malliberejestro turmentegis animoalsanulon, Eŭgenio Dvali.

En Jekaterinoslava malliberejo, kiel estas pruvita en la juĝejo, oni ĉirkaŭpremadis la kapojn de la malliberuloj per feraj ringoj.

En Orla malliberejo la turmentegadoj finiĝas per simpla mortigo. Tie oni jetas kunligitajn viktimojn el alteco sur ŝtonan plankon kaj oni ilin batadas per ŝlosiloj sub ripojn, kaj la pugna batado servas kiel sporto por la gardistoj.

En Sliselburga modela malliberejo oni batas simple per bastonoj.

Oni batadas en Peterburga kaj Moskva malliberejoj.

La devo de ĉiu socialisto estas diskonigi tiujn ĉi faktojn inter ĉiuj batalantoj por libereco. Ke sciu la mondo la sorton de ruslandaj revoluciuloj inter la ungegoj de Nikolo la Sangavidulo. Venki tiun ĉi internacian ĝendarmon estas intereso de la tutmonda proletariato. Nuntempe, kiam la caro

1) Traduko el la rusa laborista gazeto „Luč“ (Radio), No. 26, de la kuranta jaro.

kaj lia bandaĉo estas subtenataj de tutmonda potencularo, la konscia proletariato devas protesti kontraŭ la turmentado de la malfeliĉaj caraj militkaptitoj. Kaj tiu ĉi protesto devas aŭdiĝi el la laborista gazetarano, en kunvenoj protestantaj kontraŭ agado de caraj turmentegistoj. Kaj materiale laŭ povo ni devas subteni la malliberulojn, kiuj mortas pro malsato, malvarmo kaj korpa kaj morala elĉerpigo, per interhelpo speciale por tiu ĉi celo fonditaj institucioj en Parizo kaj Krakovo.

Tiam la tutmonda unuiginta potencularo konvinkiĝos, ke nia solena devizo: „Proletarioj de ĉiuj landoj, unuigu!“ ne estas seneŭa voĉo.

Al agado de la caro, aprokata de ĉiuj kontraŭuloj de la liberiga movado, ni kontraŭmetos nian solidaran malaprobbon — kaj ni esprimu nian simpatian al la malfeliĉaj caraj militkaptitoj.

Tian adreson oni povas kaj devas sendi al la socialdemokrata fraccio en rusa parlamento (Dumo). Tiu ĉi fraccio estas la sola reprezentanto kaj defendanto de la tutruslanda proletariato kaj samtempe defendanto de ĉiuj humiligitaj kaj ofenditaj.

M. KRAFT.

Respondoj kaj opinioj.

La E.S.F.I.O. (Esperanta Sekcio Franca de la Internacia Organizaĵo) ĉagrene kortuŝita de la maljustaĵo farita kontraŭ unu el siaj amikoj esperantistaj, la kapitano Cacouault, protestas kontraŭ la forlokigo de tiu oficiro, sendita malfavore de Saint-Maixent al Bastia, pro liaj homamaj paroloj.

E.S.F.I.O. gratulas la kapitanon Cacouault, kiu kuraĝis montri al siaj soldatoj kiaj estas la abomenindaĵoj de la milito, hodiaŭ malestimata de ĉiuj konsciaj proletarioj, kaj permesebla nur kiam ĝi estas defenda: ĝi gratulas lin ĉar li malkaŝe esprimis antaŭ siaj soldatoj la esperon, ke baldaŭ la popoloj scios forigi la militon.

Ĝi sendas al kapitano Cacouault sian fratan saluton kaj kuraĝigon. La sekretario SENRONO.

Por la Milito. Mi kaj kelkaj socialistaj kamaradoj sentigis devigata esprimi nian konsenton al I. S. R. por la artikolo „Balkanmilito“ kaj la respondo al la „Protesto“.

Kion signifas liberigaj militoj ni bone vidis en Germanujo.

Post la „liberiga milito” kontraŭ Napoleon en 1813, kies centjaran revenon nun festenas la ŝovinista burĝaro, komenciĝis plej akra reakcio. La popolo, kiu „savis la patrujon de fremda regneco” per sia sango, poste estis subpremigata de sia propra registraro. Versajne la sama okazos en Balkanujo. Por tio estu nia devizo: For la milito!

BRUNO BÜCKLER, Werdaŭ i/S., Germ.

Respondo de Esfio al K-do Panlou (vidi no. 2, p. 35). 1e: La diskutado de l' projekto ne okazis en la Komisiono de l' Armeo. Ĉu fakte la komisio diskutis? ... ne — la diskutado estis perfide kaj subtile evitata. (A. Dunois).

2e: En la parlamento okazis la samo. Tri „radikalaj” deputitoj diris en la „Cour Assises de la Seine”, la 19an de Junio 1912, ke laŭ surprizo, ili voĉdonis la leĝon. S-ro Godart, unu el tiuj tri, diris: „Oni deklaris antaŭe al ni, ke oni volis elpeli la krimulojn el la armeo, sed oni ne parolis pri anti-militaristoj. La registraro nin trompis”.

3e: Estas pura mensogo, skribi, ke Compère-Morel „sankciis la principon” de la leĝo. En no. de la 7a de Aŭgusto 1912, Amidée Dunois skribis en la „Guerre Sociale”: „Se ili (la anarĥiistoj) estus legintaj la leĝon, ili estus vidintaj, ke la propono Compère-Morel lasis nenion ekzisti (en la leĝo), kio koncernas antimilitarismojn kaj ribelon.”

4e: Fakte la ŝanĝo, kiun la parlamenta socialista grupo sukcesis enkonduki en la leĝon sufiĉis. Ĝis nun neniu estis sendata al la afrikaj taĉmentoj. La leĝo ne povis frapi eĉ unu antimilitariston, nek socialiston.

SENRONO.

Mia respondo al publika letero de K-do Edmondoz (n-ro 2, p. 30). Amata k-do, por ŝpari lokon en nia I. S. R., plej volonte mi tute ne respondus al viaj riproĉoj; sed ĉar vi penas konvinki la k-dojn pri mia mensogemeco aŭ pli ĝuste friponeco, mi estas devigita reveni al tio, kio, bedaŭrinde, efektive okazis.

Vi priskribas la pro militan paroladon de Liebermann en la parlamento (kvankam li dum ĉi tiu citis la tutan polan popolon kaj social-demokrataron) kiel esprimado de propraj sentoj, je kio multaj partianoj nekonsentis. Kial do vi kuraĝas insulti min pro mia malkontenteco? Mi diras al vi denove: mi ne konsentas, tute ne, al ĉi tiuj propraj(?) sentoj en nomo de German-Aŭstria social-demokratato. Vi tute ne rajtas eligi

min el social-demokratato kaj envicigi inter burĝaro. Mi per mia raporto celis atentigi kamaradojn al singardemeco, ĉar gvidantoj, kies devo estas nur al fina celo gvidi, tre deflankiĝis (per la agado pri kiu mi skribis) de la vojo fiksita per la programo, kaj ĝuste tial mi skribis „la reprezentantoj de laboranta popolo” en krampetoj; ĉar paroli en sufiĉe militema parlamento por ia milito, ne estas defendi niajn rajtojn.

Pri fanatikuoj Francaj, Anglaj k.t.p. mi skribi ne povis, ĉar mia raporto rilatis Bohemujon, kie loĝas nur Bohemoj kaj Germanoj. Bohemoj deziris nenian militon (estas multaj el ili kondamnitaj en malliberejoj pro kontraŭmilitaj, ofte eĉ ne gravaj esprimoj). Ankaŭ mi ne intencis ofendi ĉi tie loĝantajn pacemajn Germanojn, sed tiujn, kiuj plej volonte vidus, ke tuta mondo estus germana.

La vorteton „oni” mi uzis ne tial ke mi estus volinta ĝeneraligi mian opinion, sed ĝuste tial ke mi per ĝi deziris esprimi opinion ĝeneralan (eĉ multaj soc. dem.).

La ne-ĉeeston de multaj el niaj deputitoj dum grava balotado (ankaŭ rilatanta manifeston de packongreso) vi mem ne povos nei, do estas senvaloraj ke mi plu diskutu pri tio kun vi. Nur mi devas al vi sciigi, ke ni tial nenion sciis pri packongreso (rilate ĝia agado), ĉar ĉiu iom pli grava raporto presita en la gazetoj estis konfiskita.

Koncerne la detruadon de rusa carismo, mi tre volonte konsentus, ke ĝi estu detruita. Sed aĉeti ĉi tiun detruadon per tuteŭropa milito, kiu estus konsekvenco de milito aŭstria-rusa, tio estus tro multekosta kaj tial mi pensas, ke la kamaradoj de Rusujo, kun helpo nia, iam estos sufiĉe fortaj por ĝin detruai. Cetere, ni ĉi tie en Aŭstrio mem devas multe forigi por boneco de homaro.

Entuziasmon por la milito en Balkanlandoj, Polujo kaj Alpoj landoj mi deduktas laŭ sekvanta: En Balkanlandoj eĉ plej granda parto el la popolo deziris militon kaj ĉe Poloj kaj Alplandanoj parolis por la milito eĉ deputitoj.

Mian nomon, kamarado, al vi diri mi ne povas, ĉar mia raporto kritikis ankaŭ agadon de potenculoj, kiuj scias persekuti; sed mi al vi diras, ke mi estas homo, kiu jam sufiĉe suferis, devigita de ĝia dekkvarjaro perlaboro gajni tiom, kiom li por la vivo bezonis, kaj kiu, lerninte en Germanujo masonistmetion kaj tie pli longe ol dek jaroj laborinte, tute ne malamas Germanojn kiel vi al li riproĉas, sed kiu, ne blinde ĉion kredante, kritikis tion, kio al li ne plaĉas, kaj kiu al vi dankas por la amikeco esperantista, se vi ne

sentas vin amike al li kiel kamarado soc. dem., ĉar Esperantisto povas esti eĉ plej granda reakciulo (Alfonso reĝo de Hispanujo, permesis mortigi maljuste Ferrer, kvankam ambaŭ estis Esperantistoj).

Tio estas miaj lastaj vortoj koncerne ĉi tiu maldolĉa afero.

VERAMA, soc. dem.

KORESPONDADO.

Germanujo: K-do Paul Meyer, Schönhäuser Allee 181/II, Berlin 37; kun la tuta ekstergermana mondo. — K-do Willy Kalitzke, muzikinstrumentisto, Rosenthalerstr. 57, Berlin; ĉiam tuj resp. — K-do H. Schneider, Lindenstr. 47/II, Düsseldorf 16; dez. kor. kun alilandaj gek.-doj. — K-do M. Wagenknecht, Merseburgerstr. 150II, Halle a. S.; dez. kor. kun eksterlandanoj; ĉiam resp. — K-do Arno Köhler, Zinssendorferstr. 17/1, Chemnitz-Altendorf, dez. kor.

Francujo: K-doj Jourdan, 14 rue Desnoyer, Paris 20e. — Hubert, 27 rue des Chauffourniers, Paris 19e. — F. Spault, 8 passage des Muriers, Paris 20e, tri lernantoj el „Liberiga Stelo”, dez. kor. kun alilandaj k-doj.

Portugalujo: K-do Manoel da Silva Carvalho, Rua de S. Braz 209, Porto; dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj per il. pk. — K-do Raul M. de Azvedo Corrêa, Rua Sinto d'Aranjo, Leça de Salmeira, dez. internacie kor.

Aŭstrio: K-do Rojek Rudolf, XII Flurschützenstrasse 3i 7, Wien. — K-do D. Lenger, Via Stadion 12/IV, Trieste, dez. interŝanĝi il. pk. kun gek.-oj el Nederlando, Danujo, Anglujo, Norvegujo, Svedujo en esperanta, germana, franca kaj itala lingvoj.

Nederlando: P. Krijt, de Zaandam, transloĝis al: Westzaan (prov. Noord-Holland), Krabbelbuurt D 53. — K-do J. Taanman, Bootenmakersstr. 59, Zaandam; dez. kor.

Hispanujo: K-do D. Garcia, Str. Valle, Tarrasa, prov. Barcelona, dez. kor. per il. pk. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

1a de Majo proksimiĝas.

K-doj, I.S.R. eldonis belegan broŝuron: La Signifo de la Unua de Majo, de Enrico Ferri, trad de P. S.; 32 paĝojn; prezo 8 spesdekojn.